



ĜENERALA MEMBROKUNVENO

Kunsido de la 20a de majo 2018

Dimanĉon la 20an de majo 2018, de la 9a15 ĝis la 12a kunsidis en Du-Pontoj (Zweibrücken) la Membrokunveno de Esperanto-France. Ĉeestis 32 homoj.
Prezidis: Axel Rousseau (AR). Protokolis: Emmanuelle Richard (ER)

1. REZULTO DE LA VOĈDONOJ

Agada raporto 2016-2017

La agada raporto legeblas ĉere: <https://esperanto-france.org/rapport-annuel-2016-2017>

Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	2
Valide voĉdonis:	238
Sindetenis:	8
JES:	226
NE:	4

⇒ Agada raporto aprobita

Rimarkoj de la publiko:

- Kelkaj membroj ricevis la alvokon tro malfrue kaj ne povis peti la paperan dokumenton.
- Por la venonta jaro, estus bone sendi la raporton iomete pli frue, kaj ankaŭ disponigi printitan version dum la kongreso.

Financa raporto 2016-2017

La financa raporto legeblas ĉere: <https://esperanto-france.org/finances/2017/>

Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	2
Valide voĉdonis:	238
Sindetenis:	12
JES:	222
NE:	4

⇒ Financa raporto aprobita

Parta renovigo de la Komitato

7 homoj kandidatiĝis por renovigo de la duono de la Komitato (8 postenoj):


Voĉdonis:	240
Nevalide voĉdonis:	0
Valide voĉdonis:	240
Postulita minimumo :	121

Alexandre ANDRÉ:	239
Raymonde COQUISART:	233
Xavier GODIVIER:	236
Julia HÉDOUX:	239
Aleks KADAR:	234
Didier LOISON:	240
Sébastien MONTAGNE:	239

⇒ Ĉiuj 7 kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al ili kaj bonvenon en la Komitato(n)!

2. FINANCO

Financaj rezultoj (en eŭroj, laŭ jaro)



Pri UK en Lille: la profito estis ĉ. 7000 €. Ni ricevis la monon post oktobro 2017, do ĝi ne aperas en tiu raporto.

Pri kotizoj: membroj atentigas, ke la aliĝilo alvenis tro malfrue por la kotizoj povu esti enspezitaj en

2017. La estraro klarigas, ke ne eblis sendi ĝin pli frue pro diversaj kialoj, teknikaj kaj ne-teknikaj. Ekzemple ni devis finpreti la novan katalogon kaj la libreton por la membroj por sendi ilin samtempe. En 2018, UFE klopodu prepari la aliĝilon por septembro.

Pri donacoj: estus interese por la membroj havi la eblecon pagi etan sumon ĉiumonate, por kotizoj aŭ donacoj. Tio ankoraŭ ne eblas, kaj ne baldaŭ eblos.

Bankkonto ĉe CIC


Kiel decidite, la konto estis fermita.

Ideo malfermi novan konton por ebligi pli efikajn monĝirojn. Nuntempe, la banko "Crédit Coopératif" postulas iun "kalkulilon" por sekurigi la ĝirojn. Sed tiu sekuro starigas diversajn problemojn. Ni ne povas aŭtomatigi la ĝirojn, nur unu persono povas havi tiun "kalkulilon", do se Anne-Émilie Ravache havis ĝin en Rouen, Sébastien Montagne ne povis ĝiri monon el Nantes.

Tiun novan konton ĉe alia banko, ni povos uzi por naciaj kaj internaciaj ĝiroj. Ni tamen konservos nian aktualan konton ĉe Crédit Coopératif. Ni elektos etikan bankon. Laŭ la unuaj serĉoj, la banko "Crédit Mutuel" ŝajnas plenumi ĉiujn kondiĉojn.

Membraraj statistikoj

membres par année



Le Monde de l'Espéranto: nova dissend-sistemo


(ekde oktobro 2016)

Rete: senpage por ĉiuj.

Papere grupe kaj amase: sendita senpage al la federacioj, kluboj kaj asocioj, kaj al mediatekoj kaj bibliotekoj (same kiel antaŭe).

Papere unuope: sendita senpage al izolataj membroj *se petita*.


Rezultoj de la nova sistemo:



Financa stato de LME:

Presado de LME:

- ĝis 2016: financita de abonoj;
- ekde okt. 2016: financita de specifaj donacoj.



Rimarkoj de la publiko:

1. Kelkaj membroj, kiuj zorgas pri disdoni la revuoj al klubanoj, bibliotekoj, ktp. demandas kiom kostas la sendado perpoŝte de unu numero, kaj demandis sin ĉu finance ne pli kostas, kiam kelkaj homoj pasas tempon, energion kaj monon por disdoni aron da revuon ĉirkaŭ si.

Noto: kostas 1,60€ por sendi unu numeron.

Pri kiom kostas LME entute, bonvolu legi la finanĉan raporton.

2. Kio pri la dumvivaj membroj? Notinde, ke dumvivaj membroj estis antaŭe aŭtomate abonataj al LME
3. Kio pri abonoj kiel aliaj revuoj? La antaŭa sistemo estis tia. Ni ne planas reiri al tiu sistemo.

Franca Interasocia Kotizo

12 lokaj kluboj (2 novaj ĉi-jare) partoprenas al la Franca Interasocia Kotizo: Albertville, **Amiens**, Bourg-en-Bresse, Béziers, Dôle, Gap, Marseille, Moûtiers, Nîmes, **Orléans**, Périgueux, Strasbourg... kaj la via: kiam?

La kotizo entenas 10 eŭrojn por EF (kiu postĝiras 1 eŭron al EEU, eventuale 1 eŭron al GEE...); EF sendas impostatestilon al la aliĝantoj.

Prognoza buĝeto por 2018-2019

Interna kaj eksterna komunikado	2 000 €	Kotizoj	15 000 €
Revuo	10 000 €	Donacoj	15 000 €
Libroservo	10 000 €	Libroservo	20 000 €
Universala Kongreso	60 000 €	Universala Kongreso	65 000 €
Salajro	23 000 €	Bankaj interezoj	1 000 €

Elspezoj de la sidejo	11 000 €		
Elspezoj	116 000 €	Enspezoj	116 000 €

Voĉdono pri la financa raporto:

Voĉdonas:	32
Kontraŭas:	0
Sindetenas:	1
Aprobas:	31

⇒ **Financa buĝeto aprobata**

3. AGADOJ

Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado (ERIK)

Informoj kolektitaj tra diversaj dissendolistoj kaj sociaj retoj.


Aperas sur la retejo de EF: <https://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse>


Mankantajn ligilojn kaj skanaĵojn sendu al: presse@esperanto-france.org

Kelkaj videoj parolis pri Esperanto, pri kiuj vi povas legi en

<https://esperanto-france.org/reportages-videos>

Vizitoj al nia retejo: <https://esperanto-france.org/>





Klarigoj pri kelka "pikoj" (aŭ "truoj")

- en majo 2017: retaj videoj de Poisson Fécond, fama lingvema jutubisto
- en aprilo 2018: pro personaj kialoj, la respondeculo pri informado sendis malpli da pepaĵoj au Facebook-aj informoj ol kutime. Ni povas konstati ke samtempe la vizitoj malkreskis, do estas grave regule sendi informojn.
- en majo 2018: ekspozicio en Quérien organizata de Françoise Noireau estigis plurajn artikolojn kaj radioelsendon (France Bleu Breizh-Izel)

Por krei urban aŭ federacian retadreson:

Necesas:

- sendi la liston de viaj estraranoj (tiuj, kiuj ricevos la mesaĝon)
- al info@esperanto-france.org
- kaj atendi konfirmon

Nun ekzistas:

alberville@esperanto-france.org ,	amiens@esperanto-france.org ,
bourg-en-bresse@esperanto-france.org ,	beziers@esperanto-france.org ,
dole@esperanto-france.org ,	gap@esperanto-france.org ,
marseille@esperanto-france.org ,	moutiers@esperanto-france.org ,
nimes@esperanto-france.org ,	orleans@esperanto-france.org ,
perigueux@esperanto-france.org ,	strasbourg@esperanto-france.org

Noto: Tiu sistemo estas nun proponata nur por la ligitaj federacioj kaj la lokaj asocioj, kiuj aliĝas al la nova kotiza sistemo.

Rimarkoj de la publiko:

Tiu sistemo estas aparte utila por kontakti la lokajn klubojn okaze de prelegturneoj.

Esperanto-Aktiv'

Informletero sendita (ĉefe rete) ĉiumonate al pli ol 4000 homoj, kvankam nur ĉ. 100-200 legantoj rete. Plie, paperaj leteroj estas sendataj perpoŝte al averaĝe 70 homoj.

(La nombro indikita 70 estas meza nombro: 55 en aprilo 2018 kaj preskaŭ 80 fine de jaro 2017).

Kvar artikoloj:

- **Découvertes:** ĉefartikolo pri la Esperanto-kulturo, intervjuoj kun Esperanto-aktivuloj;
- **Ils l'ont fait...:** raportoj pri pasintaj eventoj;
- **Calendrier:** anoncoj de venontaj eventoj;
- **Lu, vu, entendu:** recenzo pri libro, KD, ktp.

Bonvolu sendi al esperanto-aktiv@esperanto-france.org: ĉu recenzon, ĉu anoncon de venonta evento, ĉu raporton pri pasinta evento, eĉ ĉu temon/ideon por venonta ĉefartikolo.

iKurso

Répartition par mois :

Entre parenthèses figure une estimation pour le mois en cours

	Ont commencé ce mois					
	Inscrit	ont validé leur inscription	ont reçu un correcteur	sont actuellement en cours	ont abandonné	ont fini
Mai 2018	128	108	42 (65)	42	0	0
Avril 2018	163	150	53	45	2	6 (11%)
Mars 2018	204	191	60	35	17	8 (13%)
Février 2018	206	195	72	27	39	6 (8%)
Janvier 2018	305	287	108	42	53	13 (12%)
Décembre 2017	262	239	55	12	37	6 (11%)
Novembre 2017	207	177	58	16	33	9 (16%)
Octobre 2017	219	197	51	8	37	6 (12%)
Septembre 2017	212	190	65	14	39	12 (18%)
Août 2017	269	246	70	6	50	14 (20%)
Juillet 2017	357	315	97	14	72	11 (11%)
Juin 2017	258	237	74	3	55	16 (22%)
Mai 2017	925	792	173	9	142	22 (13%)
Avril 2017	244	200	55	3	37	15 (27%)
Mars 2017	152	122	45	1	33	11 (24%)
Février 2017	198	160	42	0	31	11 (26%)
Janvier 2017	127	99	28	2	17	9 (32%)

Rimarkoj de la publiko:

1. Estus interese sendi demandojn al tiuj, kiuj rezignas, por scii kial kaj kion ni povus fari por plibonigi la kurson. Tamen, ni certe ne ricevos multe da respondoj.
2. Estus bone peti de la korektantoj, ke ili instigu siajn lernantojn trapasi ekzamenojn, ne nur eŭropajn sed ankaŭ organizatajn de la Franca Esperanto Instituto.

3. Iuj korektantoj informas, ke estas interese sekvi lernantojn de la sama regiono, ĉar tio ebligas inviti ilin al lokaj eventoj.

Renovigo de la sidejo

Post la instalado de novaj fenestroj, ni nun estas pripensante renovigi diversajn ĉambrojn de la sidejo por gajni lokon. Laborgrupo jam kunsidis por proponi konkretan planon.

Konkurso Poésie en liberté

Espéranto-France apogas tiun konkurson, kiu celas liceanojn kaj ekde 2017 ebligas al la kandidatoj proponi poemojn en Esperanto. La limdato estis fino de aprilo 2018. Ni ricevis 44 poemojn, inter kiuj 22 el Francio.

Komence de julio estos granda kunveno en La Sorbonne, en oktobro libro estos eldonita. Esperantaj poemoj estos aldonitaj ene.

4. KULTURO, ELDONO KAJ KONGRESOJ

Rilatoj kun UNESKO

La 11an de decembro, granda ceremonio okazis en la Unesko sidejo en Parizo. Esperanto-France finance partoprenis je 1000 €. Esperanto-Paris-Ile-de-France zorgis pri la akceptado. Didier Loison kreis la retajn paĝon kaj aliĝilon. Li mendis la matenmanĝon, engaĝigis kaj fotokopiigis la paperan programon.

Eldonoj

Nova eldono de la Metodo11

La Eta Princo

Projektoj de venontaj eldonoj

Propono de Facila libro "Stranga Malapero" por plenkreskuloj kun helpiloj por plenkreskulaj komencantoj.

Venontaj kongresoj

Jen proponoj:

2019: en Rouen

2020: en Pluezeko, komuna kongreso inter EF, SAT-Amikaro kaj la fervojistoj

5. Kromaj demandoj

Rimarko de la publiko:

Kapti la okazon de la eŭropaj balotoj por kontakti politikistojn kaj atentigi ilin pri la lingvaj problemoj kaj Esperanto.